2.ª JARO N.º 17 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 1 JULIO 1937

# PoPola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA VALENCIA (Hispanio)
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25

## SUFERE LERNANTE...


Bilbao falis! Efektiviĝis finfine la granda domaĝo, kies perspektivo jam aperis minace antaŭ kelkaj semajnoj. Ni scias, en tiaj okazoj, pri la nula valoro de admonoj k plendoj. Stare vibras la konfeso pri la gravo de la perdo; tial ni pretendas, ke neniu faru tro ĝeme patosajn cedojn al la pesimismo. Ni aspiras atingi fidon, sen intenco uzi la vanajn rimedojn de oportuna bombasta literaturo. Nenia agiteca ŝablono taŭgas por la cirkonstancoj. Nenia febra frazo do, kun eskorto de admiraj signoj, por pravigi erarojn aŭ por inokuli fervoron en venkitajn spiritojn. Tio estus kvazaŭ propono galvanizi mortintojn. La kadavrojn de Baskio, k de ĉiuj aliaj sektoroj, neniu startos vivige. Ili mortis, k, mortinte, ili plenumis sian devon. Nia tasko estas nun venĝi ilin, venke batalante, aŭ imiti ilin, ankaŭ mortante heroe, se necese... Triviala ŝato al la vivo estas baro por la vivo mem!

Per la profanemaj paŝoj de italaj k germanaj regimentoj, tra la stratoj de la norda urbo, kun vundoj pro kvin cent kanonoj, elŝipigitaj antaŭ la puritanaj nazoj de anglaj revizoroj, pereis abrupte la Kontrolo; ĝi mortis sen honoro nek utilo por siaj elpensintoj. Naskiĝinte pro stranga gravediĝo de timoj kun hezitoj —ne pro lojala koincido—la Kontrolo estis: por la demokrataj aŭtoroj, groteska rifuĝejo por eviti moralajn riproĉojn; por la faŝistaj aktoroj, konvena farso per kiu ili akcentis, sen riskoj, sian politikon je konkreta helpo al la perfiduloj; por ni, viktimoj, fripona rikano; por la Juro internacia—kodo absolute ĉifita—laŭba folieto malfacile kaŝanta la hontindaĵojn de cementa diplomataro. Por ĉiuj do, la Kontrolo knaris kiel perfekta simbolo pri mensogo! Sub tuba ĉapelo ofte nestas metafore la korvoj...

La sekvoj de fuŝa metodo promenas parade: Legitima registaro—kiu alia, en Eŭropo, povas svingi pli aroge tiun titolon?—kun ofendita digno k strangolita gorĝo, sen eblo defendi siajn rajtojn plej elementajn. Bando, da perfidaj ribelintaj militistoj, agnoskita kiel normala batalanto. Nia lando invadita de fremdaj divizioj. Krima blindeco antaŭ la barbareco, de tiu invadintoj mem, sur urboj k monumentoj, kontraŭ virinoj k buboj... Ĉu mankas io? nur jeno: ke Italio k Germanio, sen farsa masko, faru jam oficiale la militon kontraŭ la hispana Respubliko! Ĉu la ĵusa skandalo de la du tiranoj estas jam simptomo? kion respondos al tio Francio k Anglio? Ha, jam ne plu validas hieroglifaj deklaroj nek kuniklaj ridetoj! Se la malglora fiasko de la Kontrolo donas movliberon al piratoj por kaperaj atakoj, kiajn impresojn tio faros en Londono k Parizo? Ignorado estus natura broĉo por la ĉifona politiko de Ne-Interveno, sed ankaŭ la krimo plej blasfema el ĉiuj epokoj, la peko plej fia kontraŭ la progresema homaro.

Sufere lernante, ni forĝas la feron de nia obstino k sorto, por nepra la venko, spite batojn eble necesajn; malgraŭ skuo de multaj teorioj k eĉ kontraŭ la galo de multaj disreviĝoj. Ironie—konsciel—pli ol unu fojon, oni aludis la paradokson, kiu brulas inkandeske pro la skrapanta fakto ke, dum kruda postulo de l' Destino, la respublikanoj k proletoj el Hispanio estas fatale devigataj defendi k indiĝi, per sia vivo, la interesojn k eĉ la vivon mem de tiuj, kiuj, varme k morale bezonataj por premi kapon de la sama drako, serioze rifuzas al ni sian helpon. Kia drasta temo, estas nur tiu detalo de nia milito!

Instinkte memoras pri tio la popolaj soldatoj batalantaj tre entuziasme por propra k nesia liberoj. Ili meditas pri normoj de konduto, pri la sinteno de tiuj, kiuj, trans la naciaj limoj, komforte sidantaj sur respondecaj seĝegoj de sindikatoj, partioj k eĉ en ministeriaj ĉambroj, pagas la nepageblajn servojn de la hispana popolo per glaciaj moneroj el maldanko. Inter ĉiuj, tiom abundaj, altaj kvalitoj de nia epopeo, neniu estas pli impona ol tiu ĵus menciita. Ni ŝirmas avare k furioze nian feliĉon, sed ankaŭ samtempe tiun de aliaj landoj, kiuj perdis ĝin hieraŭ k riskas perdi ĝin morgaŭ. Laŭ akuta premo de la faŝista ringo, kia pasio fluos, pro nia sincera voĉo, tra la dikaj arterioj de la opinio internacia? Mankas urĝa dinamika doloro, neniel rezigna plendado! Bilbao estas voko, ĝi falis disputante la terenon, futon post futo. Jen klasika leciono pri revolucia heroismo k pri civitana stimulo. Je ĝia respektinda nomo, ni invitas ankoraŭfoje la eksterajn amikojn veki la dormon aŭ vipi la neglekton de siaj surdaj gvidantoj, dum la hispanoj senripoze, sen velko de fido, luktas k luktadas, kontraŭ aktivaj atakoj, kontraŭ pasivaj intrigoj, kontraŭ historia komploto! por triumfe kapti la venkon, tra zigzagaj ondoj de gajnoj k perdoj, sufere lernante...



EDEN
Bastoneto de diplomata orkestro

## AMO INTERNACIA POR NIA INFANARO

La korespondanto en Bilbao de angla gazeto «Dail Herald» raportis pri la evakuado; ni tradukas interesan mallongan fragmenton.

«Infano, dekdu-jaraĝa, estis perforte kondukita, hodiaŭ frumatene, al haveno por enŝipigi lin en ŝipo «Habana» kiu transportos 2.300 infanojn al Francio.

La infano kriadis: «Ni ne volas iri, mi volas lukti kontraŭ la faŝistoj, ili mortigis mian patrinon».

Kiel tiu, mi ĉeestis aliajn tragikajn scenojn hodiaŭ matene, kiam la geinfanoj adiaŭis la baskan ĉefurbon.

Ili estis, ĝis la kajo, akompanataj de multaj gepatroj, kiuj kortuŝe ploradis.

Je la dua eliris la ŝipo, eskortita de du militŝipoj ĝis la limo de teritoriaj akvoj.

Kiam la «Habana» trapasis tiun limon, du nigraj siluetoj aperis en la horizonto; ili estis la ribelaj militŝipoj «Almirante Cervera» k «Velasco», kun kanonoj pretaj al pafado.

Sed tuj aperis tria, pli granda, silueto; tiu de brita ŝipo «Royal Oak».

Ĝi ordonis: «La vojon libera», k la ribelaj ŝipoj foriris. La valora kargo, el estonta civitanaro, trankvile naĝis renkonte al la karesaj hejmoj de la najbara internacia solidareco.»

## NOVA MANOVRO

En nia antaŭa numero, ni klarigis detale la incidenton de Ibiza. Jus okazis alia incidento, dua epizodo de la provokema manovrado elpensita de germana diplomataro, kiu deziras havi pretekston per sendi, rekte k malkaŝe, armeon kontraŭ nia registaro.

Eble Germanio, pro la eniro en Bilbao k pro la franca politika krizo, kredis ke la nuna momento estas plej taŭga por definitiva atako; k elpensis la incidenton pri atako al militŝipo «Leipzig», atako, kiu nur ekzistis ĉe la fantazio de germanaj faŝistoj.

La 15-an Junio, je la 10.ª nokte, germana radiostacio Radio Sttutgart prononcis jenajn jam forgesitajn vortojn:

«La onidiroj dissenditaj de fremda gazetaro pri atako al krozŝipo *Leipzig* fare de hispanaj «ruĝuloj» estas tute malveraj. Tiuj informoj devenas el malpura fonto, k devas esti taksataj kiel elpensaĵo, kreita laŭ plano malbonintenca. La komandanto de la ŝipo sciigis hodiaŭ per telegramo, responde al peto de Ministerio de militŝiparo de la Regno, ke ĉio marŝas bone surŝipe k ke la krozŝipo estas havinta nenian incidenton»

Tamen, poste, la registaro bruigis la aferon ĉar ĝi tion kredis konvena al sia taktiko. Tiamaniere neniu atentos la barbaraĵojn, kiujn ili plenumas en Baskio k kreos gravan situacion al demokrataj landoj dum plej favora okazo. La incidento estas tute falsa. Dum la tagoj cititaj, la registaraj submarenoj estis ĉiuj en haveno, kiel asertis nia registaro, kiu tion povas klare k facile pruvi. Sed oni ne povas forgesi, ke la fama Londona komitato estis tuj decidonta la forigon de fremduloj. Jen la vera motivo de la incidentoj .. Ĉu ankoraŭ ili trompas tun?

## BILBAO ESTAS EVAKUITA, SED BASKIO NE ESTAS VENKITA!

# Registara Proklamo



Okaze de la perdo de Bilbao, la Registaro de Hispanio dissendis proklamon, al kiu apartenas jenaj emociaj k stoike akuzantaj fragmentoj:

Dum okdek tagoj k okdek noktoj je neelĉerpebla heroeco, la popolo de Baskio k ĝia glora armeo luktadis penige kontraŭ densa lavango de italaj, germanaj k marokaj trupoj. Amasoj da aeroplanoj eksterlandaj bruligis la herbejojn, la kampojn, la vilaĝojn, masakris virinojn k dispecigis infanojn. Nenio malfortigis la kuraĝon de homoj, kiuj promesis al sia digno elverŝi la lastan guton de sango en defendo de sia libero. Male, ju pli furioza estas la atako de la malamikaro, ju pli sovaĝa la ŝtormo de ĝiaj aeroplanoj, ju pli terura la pluvego de obusoj de ĝia artilerio, des pli heroeca la volforto de niaj soldatoj, kiuj preferis milfoje morti en la tranĉeoj ol forlasi ilin al la faŝistoj.

Kiam la tuta mondo povos koni detale tiun heroaĵon, sen precedenco en la bataloj de Historio, ĝi ektremos antaŭ la kuraĝo ekzempla. superhoma, senmorta, de popolo pacema k laborema, luktanta volonte ĉar ĝi ne volas submetiĝi al la forto k al la bruteco de la invadintoj.

Malkuraĝa aviadilaro, multfoje venkita de la gloraj flugiloj de la Respubliko sub la ĉielo de Madrido, de Andaluzio, de Aragono, ŝirmita de la malfacilaĵoj geografiaj, ebligantaj al ĝi la senpunecon, kruelege detruis la tutan regionon k provis limigi la lukton al buĉado, en kiu la armeoj apenaŭ interkontaktiĝis. La taktiko de teroro senlime funkciis!

Bilbao estas evakuita, sed Baskio ne estas venkita. Popolo, kiu luktas ĝisfine; armeo, kiu kapablas evakui urbon savante per sia sango la tutan militmaterialon, protektinte per siaj bajonetoj la eliron de la tuta civila loĝantaro k pretigas sin rezisti k daŭrigi la batalon, meritas gloron k titolon ke ĝi estas nevenkebla. En la moderna tempo reviviĝas la primitiva epoko!

La glora animo de Baskio estas nia fiero. Ĉiaj herooj estas la amataj herooj de Hispanio. Ilia sango estas la sango de nia tuta popolo. La hordoj de Franko k la fremdlanda soldataĉaro nur povis surpaŝi ruinojn, de ili mem faritaj. Nur glacia malpleno k la soleco de la mortintoj akceptadis ilin ĉe ilia eniro, ĉar eĉ ne unu basko, eĉ ne unu loĝanto de la urbo restis en ĝiaj stratoj. Cent kvin dek mil homojn enloĝigis Bilbao k ĉiuj senescepte, kun monolita malamo, preferis forlasi sian laboron, sian hejmon, sian havaĵon, ol vivi sub la sprono de sovaĝaj k barbaraj invadistoj.

La hispana popolo fieras pri Baskio. Se niaj armiloj sin kovris per gloro en la manoj de niaj baskaj fratoj, kiu tenas ilin kun pli da kuraĝo ol iam ajn, la Respubliko sin sentas pli forta, pli certa k pli decidvola akceli la lukton senŝancele ĝis la nedubebla finvenko.

Bilbao estas plua instigo por ke nia popolo streĉu fortojn en la laboro de la ariergardo, oni devas sproni sian batalemon en la frontoj k doni ĉion, en alta ofero, por venki en la kruela milito. En nia patrio estos fordetruitaj la barbaraj potencoj de la mondo, la malamikoj de la Paco, malgraŭ la senkuraĝo de kelkaj Demokratioj, rigardantaj senmove la ruinigon de nia lando. Tiu sarkasma dogano de la kontrolo taŭgis k taŭgas por certigi al la intervenistoj la senpunismon en la trafiko de ĝiaj korpusoj k de ĝia armilaro.

Ni estos indaj je tiuj, kiuj falis en Bilbao k de tiuj, kiuj batalis k bataladas kun tioma kuraĝo k fido. Ni laborados senhalte, ni luktos vigle ĝis kiam ni venkos la lastan samlandan malamikon k forpelos el nia lando, aŭ enterigos en ĝi, la invadintajn fortojn.

Por Baskio milfoje glora! Vivu la sendependeco de Hispanio!
Antaŭen ĝis la definitiva venko!

LA REGISTARO DE LA RESPUBLIKO

SPERTOJ DE ĴURNALISTOJ

# LA FAŜISTOJ TIMAS LA VERON

Brita preskorespondanto Noel Monks meritas insulton de la ebria generalo Queipo de Llano. Tiu aĉulo diris, ke oni ne povas fidi al la raportoj de la angla gazetisto. —Mi bone konas lin»—asertis la senhonora generalo. —«Li estas drinkemulo».'

Noel Monks respondis: —Ĉiuj, kiuj konas min scias, ke mi neniam, en mia tuta vivo, trinkis eĉ guton, krom akvo».

Temas pri la kronikoj de Noel Monks okaze de la sisteme scienca murdado al la civila loĝantaro en la regiono de Bilbao. La ĵurnalisto deklaris: «La Baska registaro diris al mi: —«Iru laŭplaĉe al Gernika, al Durango, kien ajn vi volos. Informiĝu senĝene. Parolu kun kiu vi deziros. Informu poste al la publiko de Londono. Ne estos cenzuro por viaj depeŝoj.» Tiel mi faris. Samtempe mi memoris pri Malago ĉe kies okupo, fare de la invadinta armeo de la intervenistoj, oni malpermesis la eniron de la eksterlandaj gazetistoj en la urbon. Nur kvar tagojn poste ni povis eniri k tiam ni nur povis raporti laŭ la kripligaj ordonoj de la konkerintoj. Dum la kvar unuaj tagoj, la invadintoj ne volis rigardantojn.»

Kompreneble. Ili ja ne povis akcepti vizitantojn ĉar ili celis bruligi, mortpafi, rabadi k fari ĉiuspecajn kruelaĵojn. Ili do bezonis ne esti ĝenataj aŭ malhelpataj per observo de scivolemaj vizitantoj el ekstero.

❖ ❖ ❖

Oni povas imagi, kion ili faris en la unuaj tagoj sen alestantoj, se oni atentas pri la raporto sendita de germana korespondanto de la Hitlera gazeto «Angriff», *(ankorau du monatojn post la konkero de Malago.*'

Jen per kiu farso, parodio de leĝa tribunalo, oni ekstermas la «ruĝulojn» daŭre k seninterrompe. Aŭskultu:

«Ni glitas inter la svarma homamaso, kiu atendas. La gvardistoj zorgas pri nova kontingento da «ruĝuloj» envicigitaj en la korto, ĉar en la ĉambroj ne plu estas loko. Ni supreniras k, enirinte en la salonon, ni vidas oficiston, leganta akton je akuzo. Li legas per monotona voĉo k nombras la krimojn kun la nomoj de la krimuloj. Oni ne aŭdas bone, sed ni komprenas. Ni scias, ke oni jam legis multajn similajn akuzojn dum la tuta tago k aliaj sennombraj sekvos ĉiutage k estis legitaj en la pasintaj tagoj. La tribunalo funkcias jam de longe k havas antaŭ si larĝan laboron. Ĝi laboras eksterordinaran kromtempon. La tasko urĝas!

Nun en la ĉambro, en angulo paroladas akuzisto aŭ defendanto. Ne gravas. Granda aro da ruĝuloj atendas la verdikton».

Pri la pledoj de defendanto, la raportisto skribis jene: «Ĉu ili imagas serioze, ke oni kredos iliajn vortojn? Vane ili klopodas. Spite al ĉio, ni estas certaj pri tio, ke la akuzitoj estos trapafitaj ĉi nokte apud la muroj de la tombejo.»

La raporto de la germana gazeto kontinuas kun cinika spleno:

«Mi iras de unu al alia ĉambro. Ĉie la sama sceno. Akuzitoj mortkomdamnotaj... Elirante, la kaptitoj estas rekondukataj, provizore, en la karcerojn. Kelkaj aspektas konfuzite, iliaj vizaĝoj estas violkoloraj. Malĝojmiene, kelkaj virinoj k infanoj sin ĵetas je iliaj piedoj, plorante senkonsole k poste ili restas en singulta lamentado, dum la bruo de la motoroj malproksimiĝas k nova grupo da malliberuloj supreniras la marmoran ŝtuparon.» Jen kia popola kalvario!



Galegio, la ĉarma k milda regiono, absolute sub regado de faŝismo, suferas ankoraŭ ĉiutage la morton de la plej fidelaj filoj de tiu bonanima popolo el kamparanoj k fiŝkaptistoj

❖ ❖ ❖

Sed ĉe la okupo de Malago, estis iu gazetisto, ankaŭ angla, Koestler, kiu ne obeis la ordonon, ne eniri la urbon. Li estis korespondanto de *News Chronicle.*

Li, enmiksiĝinte kun avangardo de germanaj k italaj trupoj, penetris frutempe. Dum tri tagoj li vidis, kiel oni murdadis, forrabis, perfortigis; kiel oni dezertigis la proletajn kvartalojn... La kvaran tagon, la faŝistoj malkovris lin, skribante notojn. Li estis tuj kaptita sub danĝero de morto.

Li prezentis sian kvaliton de neŭtrala ĵurnalisto. Li ankoraŭ estis telegrafiinta nenion. Nek la interveno de la angla konsulo savis lin. Oni enigis lin en naŭziga ĉelo de malliberejo. Li estis mortkomdamnita, kiel spiono. Li ne estis finfine ekzekutata ĉar la aliaj ĵurnalistoj, sciiĝinte pri la afero, post sia alveno, intervenigis la tutan konsularon por savi lian vivon.

La ekzekuto estis prokrastata. Oni translokigis lin al Seviljo k tie ree enkarcerigata ĝis nun. Generalo Queipo volis pafmortigi lin je ĉiuj riskoj. Li diris: «—Apenaŭ li estos libera, k en sia lando, li raportos plendetale siajn travivaĵojn. Nur la mortintoj silentas.»

Sed la faŝistoj ne kuraĝis mortigi lin. La brita registaro postulis energie, ke la gazetisto estu liberigita. Kaj li ĵus revenis hejmen terurigite.

❖ ❖ ❖

La novaĵoj el la faŝista flanko devas esti zorge ekzamenataj kun suspekto. Ĉiu el ĝiaj radiostacioj, ĉiu ĵurnalo, la tuta propagandaparato kun ĝiaj filioj en eksterlando, estas partoj de la kolosa ilaro de mensogado. La fremdaj ĵurnalistoj en la ribela teritorio tute ne ĝuas movliberon. Se ili ne devenas el faŝistaj ŝtatoj, se ili ne estas je la servo de la intervenantaj potencoj, se ili ne laŭdas la krimojn de la invadanta soldataĉaro, oni konsideras ilin kiel maldiskretajn, danĝerajn, tro babilemajn, raportistojn.

La faŝistaro do, timas la veron!

**Politiko de cedoj estas premio por bandito kaj puno por civitano**

# LA CEDOJ NE ESTAS EFIKA PUNO!

En la diplomata teksilo, oni teksas, per fadeno el salivo, blufan ŝtofon pri la volontuloj en nia milito. Italio k Germanio, intertempe, varmigas kove la ovojn de novaj, pli vastaj, provokoj. La franca k angla opinio juĝas simple, ke la tuja foriro de ĉiuj fremdaj batalantoj estas la sola rimedo por eviti la fulmojn, kiujn, pro la hispana nuna situacio, prezentas minace la nigraj nubegoj ŝvebe pendantaj super la socia mozaiko, el kampoj k urboj, de Eŭropo.

Estas jam saĝe sciate, ke ĝis kiam restados en Hispanio italaj k germanaj soldatoj, Hitler k Mussolini konsideros kiel «nacian honoron» la helpon al ili, zorgante akurate pri skandalaj sukcesoj. Tio signifas nude, ke pliaj kanonoj tondros k pliaj aeroplanoj flugos, tra la tero aŭ tra la aero de la heroe malfeliĉa lando, por venĝi la viktimojn, fatale k nepre falintaj k falontaj, pro sangosoifaj kapricoj. Ju pli da homa k milita materialo des pli da bezono ne haltigi la tragikan radon de la plej fripona k monstra intervenol



Oni devas do tuj efektivigi la foriron de ĉiuj germanaj k italaj «volontuloj». La hispana legitima Registaro estas preta akcepti la samon pri la veraj volontuloj venintaj fervore por plenumi konkretajn devojn antifaŝistajn. Tiu foriro estus ebla se la juro havus lokon en la modernaj normoj pri lojalaj kompromisoj. Sed nun, kiam la faŝistaj tiranoj ŝveligas gazetarajn k radiajn agitadojn, deklarante sankta la aventuron kontraŭ la hispana popolo; kiam ili, en plena ekonomia fiasko je la tritika fronto—kio kostas preskaŭ mil milionojn da liroj—elspezas fabelajn ciferojn liverante, al la ribeluloj, milojn da kanonoj k centojn da aviadiloj; la bonanima intereso de Francio estas kondamnita al brua fiasko same kiel, en natura sekvo, la ringo de konferencoj, konsiloj aŭ platonaj admonoj...

La franca tezo efikas nun kvazaŭ rekomendo aŭ indiko al Mussolini rezigni k perdi la multekostajn klopodojn faritajn por sklavigi la hispanojn. Se tiu miraklo okazus, la politika morto de l' faŝismo internacia estus subita. Ni ja ne povas esti tiel naivaj akcepti la solvon per la ŝnuro de tia optimismo. Oni povas akcepti ĉion krom tio! Tiranio vere ne sin mortigos!

La vertikala disfalo de tiu makiavela trabaro okazos certe, dum tute neatendita horo, ne jam pro la ĵonglaj artoj de Francio sed nur pro la kuraĝo k pro la ofero, en malŝato al la vivo, de niaj soldatoj preter la tranĉeoj de niaj frontoj. Unu fojon pli, oni povos prave aserti, ke la sola apogo por nia rajto —sankta kolektiva rajto!— estas tiu, kiu venanta internacie glitos glate sur la ebena ŝoseo de la tutmonda popola solidareco... Se la cedoj ne estas efika puno, la martelo povas esti definitiva solvo!

# HISTRIONOJ SEN MASKO

La du principoj—timo k teroro—uzitaj en Eŭropo, ĉirkaŭ la hispana milito, solidare kuniĝis por ŝveligi katastrofajn rezultatojn. Ambaŭ metodoj same koincidas en la domaĝoj k same respondecas en la drameca prologo de Eŭropo k en la apoteoza tragedio de la hispana Respubliko.

Ne validas balbutemaj senkulpigoj! Sen la politiko de timo ne estus ebla la politiko de teroro. Sen stulta hezitemo en la demokrata flanko ne aperus provokemaj fanfaronaĵoj en la faŝista kampo. La fruktoj de erara laboro ne decas esti aliaj ol ili nun estas. La Demokratio vindis tro volonte siajn okulojn per tro dika ŝtofo... Ĉu oni povis atendi, ke tiu stranga sinteno de cedoj sinsekvaj k daŭraj—deciditaj de tiuj sinjoroj, kiuj ŝajnas agi kiel advokatoj niaj—kapablus efiki, sur Italio k Germanio, kvazaŭ bremsilo en ilia freneza marŝo al imperialistaj celoj? Ĉiuj, kiuj dorlotis tiun iluzion jam ĵus ricevis frape la respondon!

Italio k Germanio, tragikaj ŝtataj histrionoj, forĵetis la maskon; ili boje forlasas la Kontrolon k verŝas la urinon de sia rikano sur la honorindecon de tiuj regestroj fidantaj, naive aŭ ruze, pri normoj de aventuristoj. Ĉiu cedo akuŝis novan postulon; ĉiu demokrata hezito sekvigis aŭdacan paŝon de l' faŝismo. Jen do pura politiko pri la bona volo, sed per tiu ŝtono la diablo pavimas la vojon al infero... En ludo tiel grava, la Demokratio donacis kondolencojn, ni metis la kadavrojn k intertempe la Faŝismo internacia sagace forportis la gajnojn.

Ĉu la apaĉa konduto de Italio k Germanio, forlasi samtempe la Kontrolon—kruela farso je ilia profito—ĉar oni ne akceptis kolektivan planon pri mara atako al Valencio, ne pruvas hele, ke la Faŝismo akceptis postenojn, en la Londona Komitato, kiel balancilojn por danĝeraj saltoj? Absolute neniu kredas je la submarena pafo kontraŭ la ŝipo «Leipzig». La groteska mensogo falas laŭ sia propra pezo. Sed, kio grimacas post la komplota kurteno? ĉu la intenco eviti plenumi la retiriĝon de volontuloj, okaze de vera decido? ĉu la deziro apliki sen ombroj la helpon al la ribeluloj? ĉiamaniere, la internacia politiko manovras, en ekstrema pinto, kiam la hispana milito hurlas en grado plej intensa.

Nu, bone: kun serena spirito ni pretas elteni rigore ĉiujn ŝancojn de nia destino. Ni ripetu vortojn de malnova konvinko: Nia venko, malgraŭ ĉio, estas certa, nun ankoraŭ kun plia fundamento! Nia ofero ne restos sen premio. La impona kolekto de niaj mortintoj ne estos superflua. Nia ŝtalo ne fleksiĝos sub premo de kanajloj. La despotismo, el ĉiuj direktoj, rompos siajn ungojn, siajn dentojn k, finfine, siajn ostojn en la morala bastiono, citadelo glora, de nia imitinda ekzemplo.

# SOLDATOJ DE POPOLO

Tiu ĉi vilaĝo ne konis la militon. La milito ja restis tie, trans la rivero, kiu dividas la Hispanion de la hispanoj je la nova kolonio de Hitler.

Subite, iun tagon, la vojoj de la vilaĝo ĝemis sub la ferajoj de la ŝarĝaŭtomobiloj plenaj je soldatoj. La soldatoj tenis grizajn bajonetojn k kuntrenis la polvon de la tuta milito. Tio estis la Popola Armeo, unu el la brakoj de la Popola Armeo, kiu alvenis tien.

Kaj tuj post ĝia alveno, meze de la placo ekstaris unu el la ĉefoj sur veturilo k diris:

«—Gefratoj! Ni venas defendi vin. La invadintoj volas trapasi ĉi tiun lokon, k ni diras, ke ni ilin haltigos. Sed estas necese, ke vi kolektive kunhelpu.»

* * *

Forpasis kvar tagoj. En la placo svarmas la popolamaso. Aperas ĉe la balkono de la vilaĝestrejo uniformoj de armeanoj. Iu komisaro sin turnas al la popolo:

«—Dankon, kamaradoj! Post kvar tagoj de nia alveno en tiu ĉi fronto, mi portas al vi saluton el ĉiuj soldatoj de la divizio, filoj de popolo, kiel vi mem. Tiuj homoj, kiuj batalas k mortas por defendi la teron, kiun la faŝismo volas forpreni de vi, faris al mi peton: ke mi danku vin pro via helpo, sen kiu la soldatoj ne povos venki la malamikon, k ke mi diru al la virinoj, ke ili estas pretaj morti por konkeri, por vi k por viaj infanoj, la pacon, la bonstaton k la ĝojon.»

La virinoj bone komprenas. Ili forviŝas la larmojn per tuko. Maljunulino asertas: «Li pravas k parolas kiel honesta viro.» Kamparana intuicio neniam eraras!

* * *

Nun alia viro ekparolas. Li havas profundajn okulojn k laboristajn manojn, kiuj levas sin super la kapoj de la kamparanoj.

«—Mi venas plenumi mian promeson. Mi diris al vi, ke la faŝistoj ne alvenus ĉi tien forpreni vian havajon. Ili ne nur ne alvenis, sed ili forkuris ses kilometrojn malantaŭen.»

La viroj, aŭskultantaj senmove, rigardas sin reciproke, antaŭ ol aprobi la vortojn de la parolanto. Fine ili ekaplaŭdas vigle, per siaj maldelikataj manoj de kamparanoj. La milita ĉefo klarigas tiam, kial liaj trupanoj k ĉiuj hispanoj bataladas:

«—Niaj soldatoj fordonas siajn junajn vivojn por konservi la teron de la vilaĝanoj k por doni teron al tiuj, kiuj ne ĝin posedis. Ni batalas en tiu ĉi fronto, en ĉiuj frontoj, por ke neniu el vi demandu plu al si: «Kion mi manĝos morgaŭ?» Nia venko sekurigos vian morgaŭon k tiun de viaj filoj.»

Neniam ili estis alparolataj tiele. La parolado kontinuas. «—Mi estas laboristo, kiel vi. Mi estis ekspluatata k persekutata. En la tranĉeoj de Hispanio estas multaj homoj kiel vi k mi.»

Nun li informas tiun popolan tribunalon pri la armilaro kaptita al la malamikoj dum kvar tagoj: dekok mitraliloj, cent kvindek fusiloj kun okdek mil kugloj... La kamparanoj aprobas kun ĝoja mieno.

«—En tiu sukceso, vi havas grandan parton. Mi ree dankas vin. Vi havigis al ni virojn por fortikigi la konkeritan teritorion. Viaj filinoj aranĝis la lernejon, kie ni instalis la hospitalon k vi ĉiuj, virinoj, alkuris apud la vunditoj kun lakto en la kruĉoj k kestoj kun ovoj. Dankon al ĉiuj k speciale al tiu virino, kiu ne havante ion por donaci, venis kun malplena glaso en sia mano dirante «al vi, ĝi povas utili!»

* * *

En la placo regas densa silentego. La viroj—knaboj k maljunuloj—al si konsultas la impresojn per rigardoj. La virinoj ekploras kun stranga emocio. La oficiro daŭrigas sian paroladon.

«—Via ekzemplo estas bonega. La soldatoj de la popolo batalas, mano en mano, kun ariergardo. Sen ariergardo ne ekzistas armeo. Ni devas venki, ĉiuj. La homoj ĉe la frontoj k tiuj, kiuj restis hejme, laborante. Kiam ni atingos la finvenkon, alvenos la feliĉa vivo k ĉiu filo demandos al sia patro: «Kion vi faris por helpi al la milita triumfo?» Ĉiu el ni bezonos respondi tiam, k ni devas havi konvinkan respondon. Kelkaj diros, ke ili batalis en la tranĉeoj k vidis fali siajn plej amatajn fratojn; aliaj respondos, ke ili plenumis sian devon laborante energie en la ariergardo, por ke nenio manku en la batalfronto. Sed estos iu, kiu ne scios kion respondi. Kaj tiam la filo, kiu ne ricevos respondon, turnos la dorson al sia patro, k li agos juste.»

Aŭdiĝas sonorilo de ambulanco k la amaso dispartiĝas por havigi al ĝi trairejon. Kun flustraj lamentoj, la virinoj ekpasas post la ambulanco. Momente, ili haltas pro la voĉo de la ĉefarmeano, kiu krias: «Tiuj vunditoj estas nia revolucia fiero!».

* * *

La kamparanoj aplaŭdas k vivuas la Respublikon. Ili komprenis ĉion klare, ĉion, kio estas malklara nur por tiuj, kiuj ne volas kompreni.

La soldatoj de la Popola Armeo parolis al la popolo, el kiu ili devenas. Kaj la popolo jesas, ĝi aprobas, ĝi atestas, ke tio estas kion ĝi volas k ke ĝi subtenos tiun entreprenon por firme masoni la venkon.

Tuj, aro da vilaĝanoj kuras sin proponi por helpo. Ili iras decide dirante, ke ili volas partopreni la fortikigan laboron. Kun senkondiĉa fervoro...

Kaj tiuj, kiuj plej entuziasme k kun pli da espero krias, estas junaj knabetoj, dek- k dekdu-jaraj. Ili gaje vivuas la Respublikon, la Popolarmeon k la Socialismon.

J. IZCARAY

# TEKNIKO PRI ABOMENO

La plej malnova milita revuo en Germanio «Militar Wochenblatt» traktas la temon pri bombardadoj al malfermaj urboj dirante:

«Neniu ŝtato nun rezignus bombardadi malfermajn urbojn. Ĝis nun, tio estis kontraŭa al homaj rajtoj k oni ne intencis tion fari, ĉar praktike, tiu teritorio estis neatakebla; sed la moderna tekniko kreis la aviadilojn, per kiuj oni povas ataki la ekonomion de l' malamiko en la ariergardo.

La «milito kompleta» estas io pli granda ol milito inter armeoj; ĝi estas milito inter popoloj k tuŝas ne nur la militajn fortojn sed ankaŭ la civilan loĝantaron k la ekonomiajn fortojn.

La milito nun estas ekonomia k ĝi minacas, per malsato, civilan loĝantaron, ne priatentante sekson nek aĝon.

Tiu milito estas proporcia al granda nivelo de nia civilizo.» Oni povas jam dubi ĉu faŝistoj estas homoj...

## PLENA SUKCESO

Estis la unua numero de la nederlandlingva POPOLA FRONTO kies eldono de mil ekzempleroj rapide elĉerpiĝis. Jam aperis la dua numero kun du mil ekzempleroj k simila bona akcepto. Kiam la vojo estas ĝusta eĉ la horizonto kreskas...

Kiu lando sekvos en vico la ekzemplon de Nederlando?

# PROLETOJ DE ĈIUJ LANDOJ, UNUIGU VIN!

La okazaĵoj en la eŭropa panoramo sin sekvas tiel rapide, kiel scenoj sur ekrano. Tial ni ne scias, ĉu niaj komentarioj estos aŭ ne aktualaj, kiam tiu ĉi numero de POPOLA FRONTO trafos niajn legantojn.

La komplezema politiko de cedoj, ĝentileco, toleremo k hezito, farita de Britio al la diktaturoj, kondukis la demokratiojn al vojkruciĝo. Eŭropo sin trovas hodiaŭ ĉe rando de abismo. Se ĝenerala kolizio ne jam eksplodis, tio estas ĉar en la jaro 1918 finiĝis la mondmilito, kies ripetiĝon timas ĉiuj, krom la faŝistaj ŝtatoj. Sed oni devas akcepti, ke en la jaro 1914 ne estis pli gravaj motivoj por komenci militon ol nuntempe, k ke la hodiaŭa situacio estas ekstreme danĝera.

Ni fieras pri tio, ke ni ne kulpas pri ĝi. La kulpuloj estas tiuj, kiuj blokadis nin per absurdaj embargoj k kontrolo; tiuj, kiuj favoris Frankon per izoligo k bojkoto al nia legitima popola Registaro.

Ni scias, ekde la komenco, ke la Kontrolo estis pulvejo, kies meĉon bruligus la faŝistoj, se necese, en oportuna momento. Se Hitler k Mussolini akceptis ĝin, post longa diskutado, dum kiu ili elŝipigis en Hispanio trupojn k armilaron, tio estis ĉar ili erare kredis, ke la kontingentoj da soldatoj k militmaterialo, havigita al la ribeluloj, sufiĉus por venki. Sed la tempo forpasis k Franko ne sukcesis.

Per ĉantaĝaj incidentoj, oni provokis komplikojn k prokrastojn, celantaj: 1) eviti elirigon al siaj soldatoj k 2) ampleksigi la alsendon de novaj «volontuloj» k armiloj.

Kreskantaj postuloj de Mussolini k Hitler okazigis, ke la Ne-Interveno fakte krevis. La sekvojn de tiu decido de la faŝistoj, forlasi la Kontrolon, oni povas facile diveni. Ili agos konsekvence kun siaj planoj. Ili ĝis nun militis kontraŭ ni, ŝirmite de la Akordo pri Ne-Interveno k protektite de la Kontrolo. De nun, ilia partopreno en la milito heliĝos eĉ por la blinduloj. Ni estas pretaj alfronti ĉiujn eventojn.

Sed, flanke de la t.n. Demokratioj, kio okazos? Ne gravas al ni la sinteno, kiun la cedemaj registaroj adoptos. Nia disreviĝo tiurilate estas, jam delonge, absoluta. Ni scias, ke ili agos atentante ekskluzive al sia intereso, al la intereso de la kapitalismo, kiun ili servas k ĵaluze defendas.

Nia sola espero estas alfiksita en la konscio de la laboristoj de la mondo. Al ili ni nin turnas, en ne angora, sed vigla alvoko, dum decida k grava horo por nia lukto, memorigante al ili, ke nia sorto estas ilia sorto, ke nia venko estas ilia venko k ke nia batalo estas ĉies batalo por la libero k la estonto de la tutmonda proletaro. Ni nur al ili povas jam fidi k ni krias: «Proletoj de ĉiuj landoj, unuigu vin, por via savo!».

Se la demokratoj k la laboristaro —la amasoj—en la mondo plenumas sian solidaran devon efike, kiel ni plenumadas senlace la nian, la tre frenezaj gvidistoj de la eŭropa Faŝismo fiaskos nepre. Se ne, aliaj popoloj spertos tre baldaŭ en sia karno nian suferadon k nian doloron. Kaj sukcesanta Faŝismo furiozos venke en Eŭropo senrimede. La makulo de tiu honto eterne estus kota stampo sur la laborista klaso. En viaj manoj estas nun via propra destino! La ŝanco, por feliĉo aŭ por angoro, dependas de la helpo, kiun vi donos al hispana popolo interne ja de via lando mem.



## SAGETOJ TRA INCIDENTOJ

● La incidenton pri la kirasŝipo «Deutschland», oni forprenis al ekzameno de la Londona Komitato k ĝi estis pritraktata de la «kvaro» da potencoj. En tiu konferenco, Germanio sukcesis trudi sian tezon pri la rajto al sindefendo, okaze de atako.

Tuj post la interkonsento, okazas «nova incidento» kun la ŝipo «Leipzig». Germanio, apogite de Italio, postulas punagadon per minaca parado de ŝiparo antaŭ Valencio. La efiko de tiu postulo estis rompiĝo de la sistemo de Kontrolo.

● Post tiu incidento, «tria incidento» ŝprucus baldaŭ. Tiam Germanio, kiu ruze submetis la aferon pri «Leipzig» al siaj tri kunuloj, alprenus memdecidon k «sin defendus» kontraŭ la urboj de la lojala marbordo.

Incidentoj «made in Germany»!

● La interŝanĝo de komunikoj inter Franko k Mussolini pri la konkero de Bilbao estas signifoplena pruvo pri la senlima k senkaŝa kunlaborado de la Romaj lupidoj al la «naciista» entrepreno en Hispanio.

Tamen, sinjoro Eden pripensis la kreadon de Komitato por enketi surloke pri la invado. Jes! Eksperimento pri komitatismo bolis...

Estu nomata nova komitato, kiu siavice nasku sub-komitaton. Kaj tiu lasta povas akuŝi «kvarpotencan» komitateton. Intertempe la somerferioj devigos komitatanojn k sub-komitatanojn, prokrasti la kunsidojn ĝis la aŭtuno.

Tiam, eble la afero estos memsolvita sen embaraso por la gravaj ŝtatviroj de Anglio. Povas esti, ke la hispanaro elĉerpiĝos pro sinsekvaj «incidentoj», kiel tiu de Almerio, kun riverencoj por la piratoj!

● La malprudentaj paroloj de Admiralo Raeder, okaze de la enterigo en Germanio al la kadavroj de la ŝipanoj de «Deutschland», subite montris, al la tuta mondo, la veran karakteron de la «incidento» k ĝian genezon, pruvante, ke estas la germana ŝipo, kiu atakis niajn aeroplanojn.

Tiu senhonta deklaro kaŭzis malagrablan surprizon en Britio. Ne ĉar la angloj ne konis la veron, komprenreble, sed ĉar ne estas dece fari tiajn cinikajn deklarojn, kiuj endanĝerigas la sanon de la Ne-Interveno.

Kaj sinjoro Eden zorgas atente pri ĝia farto...

● Ĝentila, la Brita Registaro jus invitis la germanan ministron Von Neurath viziti Londonon, kie li estus afable gastigata.

Sen malico oni povas konjekti, ke oni estus provanta konvinki lin pri tio, ke estas pli sanige por la interesoj germanaj, furniri en la orbito de la angla influo ol ĉirkaŭ la akso Romo - Berlino.

Kaj jen! Subite Von Neurath rifuzas veturi al Londono. Ĉu, pro tio ke falinte Bilbao, la sinteno de la germana regnestro aliiĝis?

Ne! Tio ja estas simpla koincido. Nova «incidento».

● Lasta incidento. Neatendite (por la naivuloj) la faŝistaj potencoj, post sia konstanta ne-observado al la reguloj de la Kontrolo, trovis pretekston por la definitiva sabotado, per forlaso de la fiaskinta sistemo.

Tiu decido povas kaŭzi la malaperon de la Akordo pri Ne-Interveno. Sed provizore taŭgos por ke la italaj k germanaj ŝipoj transportu en Hispanion novajn diviziojn, novajn aeroplanojn, novajn maŝinpafilojn, k. t. p.

Intertempe, sinjoro Eden serioze sin okupas por venigi foririntojn al plua kunlaborado... Kredeble, li sukcesos, post kelkaj semajnoj de interdiskutado, dum kiuj la elŝipigo de homoj k de materialo estos abunda. Niaflanke, ni restados severe kontrolataj de niaj amikoj Anglio k Francio.

Evidente, la klopodoj de la Demokratio por la Paco estas dankindaj!

# POPOLA REFERENDUMO

Kiel balota simpatio al nia lukto, en la esperantista mondo, estas via kortuŝa, senlaca, financa subteno al nia gazeto. Nun, kiam multaj gvidantoj fuŝas siajn devojn, vi, honesta ero el popolo, estu fiera abligi al Esperanto ludi la rolon plej noblan k plej utilan por lingvo internacia...

ĜENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono
GUSTAVE FARENC
53, Rue Brise-Pain
Poŝtĉekkonto 13944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono de holandanoj
PETRO van der PLANK
Van Speijkstraat, 48-I
poŝtĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

ANGLIO.—K-do O. MELTON.—23 Fowler Str. Nechells, BIRMINGHAM 7

SVEDIO.—ARBETAR ESPERANTISTEN.—Barnhusgatan 8 ö. g. n. b., Poŝtĝiro n.° 53411, STOCKHOLM

BELGIO. — K-do M. DELFORGE. — 33, Rue de Heigne, Poŝtĝiro 199106, CHARLEROI

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA
**POPOLA FRONTO—Mar, 25, Valencia (Hispanio)**

## NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia esperantistaro.. . | 49'95 | ptoj. |
| J. C.—Kordoba fronto. . . | 25 | » |
| Grupo Nova Sento.- Barcelona.. . . . . . . . | 12 | » |
| A. R.—Madrid. . . . . . | 5 | » |
| P. B.—Madrid. . . . . . | 10 | » |
| M.—Castuera. . . . . . | 10 | » |
| S. O.—Doncaster. . . . . | 10 | ŝil. |
| A. W. G.—Stapleford. . . | 5 | » |
| C. J.—Scunthorpe . . . . | 4'6 | » |
| W.—Coventry. . . . . . | 5 | » |
| P.—Birmingham. . . . . | 1'6 | » |
| L. P.—Toulon. . . . . . | 50 | fr. fk. |
| P. G.—Rougville. . . . . | 10 | » |
| H. D. k F. P.—Tallin. . . | 25 | » |
| J. E.—Sallaumines. . . . | 10 | » |
| J. L.—Marseille. . . . . | 10 | » |
| V. R. G. - Paris. . . . . | 10 | » |
| Esp. Klubo F. P. — Hradec Kralove. . . . . . | 75'76 | » |
| H. H.—Wetzwalde.. . . . | 15'15 | » |
| P. Z. H.—Svendborg. . . | 20 | » |
| S. P.—Fes Ville Nouvelle.. | 25 | » |
| A. L.—Kungsor. . . . . | 26 | » |
| A. B.—Kybartai. . . . . | 65 | » |
| A. W.—Aartus. . . . . . | 50 | » |
| R. B.—Plzen Letna. . . . | 25'76 | » |
| A. P.—Parnu. . . . . . | 29'76 | » |
| Lumo de Esp.—Peiping (Ĉinio) . . . . . . . . | 100 | » |
| C. P.—Vaulx en Vdin. . . | 10 | » |
| G. P.—Kasba Tadla.. . . | 10 | » |
| Lab. Esperantistoj.—Nynashamm . . . . . . . | 39'32 | » |
| R. B.—Plzen Letna. . . . | 56'82 | » |
| G.—Saint Aignau. . . . . | 5 | » |
| Kolekto en I P E-kunv.—Meckelen. . . . . . . | 11'66 | » |
| P. B.—Montrouge. . . . | 15 | » |
| J. V.—Montrouge. . . . . | 15 | » |
| E. L.—Argenteuil. . . . . | 20 | » |
| Groupe Esp. Lannemezanais. . . . . . . . . | 100 | » |
| El Hitlerio. . . . . . . | 15 | » |
| R. B.—Pozoblanco. . . . | 25 | ptoj. |
| A. N. - Arnhem.. . . . . | 10 | gd. |
| G. S. - Schoorl. . . . . | 1 | » |

## INFORMEJO

### ONI INFORMAS, KE

K-do. Sotero Perez estas nun en Popola Militlernejo Lia adreso estas: Escuela Popular de Guerra. Paterna (Valencia).

### ONI SCIVOLAS PRI

K-do. Leopoldo Soler, de Cocentaina. Oni demandas pri lia farto k nuna adreso.

K-do. Felix Galland, veninta el urbeto Boudry (Svisio). Batalanto en Internacia Brigado. Lia laste konata loĝejo, en Januaro, estis Murcia.

K-do. Enrique Martin Rubi. kiu loĝis en Tarrasa, str. Arquimedes 128, kredeble li troviĝis en Aragona batalfronto fine de lasta jaro.

**AVIZO** Al ĉiuj esperantistoj de la Internacia Brigado. Pro foriro de K do. J. Disko, de nun bonvolu vin turni por starigo de esp. rilatoj al

**K-DO HANS MARTENS**
S. R. I., 20, E— Plaza Altozano
ALBACETE (Hispanio)

## LASTA HORO

La lojala armeo en la Nordo, en siaj novaj linioj, estas preta nebuligi la «gloron» de la invadintoj.

En la sektoroj apudaj al Madrido, la malamiko pruvis atakon k ricevis trafajn batojn. En Aragonaj frontoj, niaj pozicioj pliboniĝas por gravaj operacioj en tiu okcidenta parto.

## KORESPONDADO

Atentante la insistajn petoin de multaj amikoj, ni jus decidis pruve malfermi publikan fakon pri korespondado por ebligi rektajn rilatojn inter la legantaro.

Por venonta numero ni akceptas jam anoncetojn je simpla trilinia amplekso laŭ unika tarifo de 4 fr. frankoj aŭ egalvaloro sendita al unu el niaj agentoj.

Kvin mil ekzempleroj, tra ĉiuj landoj de la tuta mondo, estas garantio ke viaj deziroj trafos multajn pliajn milojn da okuloj. Sovetianoj sendu la pagon al C. K. de S. E. U.

## POPOLFRONTA LETERUJO

A. P.—Parnu—Ni notas vian indikon pri la kvanto da ekzempleroj sendotaj. Pri la cetero de via skribaĵo, ni laŭeble plenumos viajn dezirojn. Sinceran dankon pro viaj koregaj esprimoj!

S. D — Alcaracejos — Aparte ni informas vin pri k-do. S. P. Ni ekspedis al vi ekzempleron de la laste ricevita n.° de Ĉ. H. Gramatikon ni oportune jam sendis al via fianĉino. Ni ĝojus, revidi vin baldaŭ.

Esp. Klubo—Hradec Kralove—Ni dankas vin pro la ĵus alprenita decido koncerne nin. Ni sendos po unu ekzemplero de ĉiu aperinta numero krom de tiuj, kiuj elĉerpiĝis. Generalo Mangada vivas k plenumadas sian devon senhezite

C. M. C. - Port Said - Ne gravas la sumo, kiun vi sendos. Ni devigas neniun leganton monhelpi nin. Tio estas laŭpova k tute libervola donaco, kiun ni dankas eĉ se ĝi estas eta sumo. Akceptu dankon pro viajn afablaj vortoj!

H. O. – Stockholm — Ni tre multe ŝatas vian leteron. Viaj pensoj estas absolute trafaj. Ĉies hezitemo permesis la nunan staton. Ekzistas pli da solidaro inter la faŝismoj ol inter la demokratioj. Ĉion alian ni bone notis. Ni informas vin, ke nia k-do. R. Kiles aliĝis la Armeon antaŭ kelkaj tagoj.

J. B — London – Viaj konstantaj «gutoj», kara kamarado, estas danke akceptataj. Amikan saluton!

H. C. S.—Amsterdam – Dankon pro la specimeno de sprita karteto pri funebro, okaze de balota fiasko de N. S. B. sed, kredu al ni, ne temas pri ŝerca afero. Ni ĉi tie ankaŭ primokis la danĝeron, iam en la fruaj tempoj, kiam minaco ŝajnis al ni ridiga bombasto. Ne forgesu, ke ĝi ne estas nacia forto, sed internacia komploto. Ne dubu do pri tio, ke via N. S. B. estas movado ankaŭ subtenata de la eksterlanda faŝismo.

J. L. - Pouy—Alte ni taksas viajn klopodojn rilate al Informa Servo pri Esperanto. Vian tre favoran opinion, koncerne al nia laboro, ni bone atentas k ĝi instigas nin daŭrigi nian taskon senlace k honeste, kiel ĝis nun.

G. N.—Stockolm—Via letero kortuŝis nin kamarado. Ni estimas tre sincere vian laboradon k korespondas kore al viaj sentoj.

J. W. D.—Victoria — Danke ni legis vian estimatan leteron. Ĝojigis nin la gazeteltranĉaĵo, pruvanta la intereson k bonvolon al nia tragedio.

LEA-NA.—New York—Ni notas ĉiujn komunikojn de k-do. Bonesper per letero, 9. 6. 37.

L. van E.—Dordrecht – Ni enketas pri via korespondinto. Koncerne vian alian peton, ni ne povas komplezi vin ĉar por la P. M. ni jam havas delonge antaŭfiksitajn kompromisojn. Dankon pro la R. K!

Radiko – Zagreb. Ni kordankas vian salutleteron, kiu esprimas vian solidarecon.

D. F. – London - Rilate al via ŝatata letero ni respondas; Ĉio. kion vi sendos por la k doj. de la Internacia Brigado pere de ni, certe trafos ilin. Antaŭdankon! Ni aperigos en P. F. kiel eble plej baldaŭ, artikolon pri la temo, kiu interesas vin. La respondo de Bernard Shaw estis, bedaŭrinde, ĝusta. Ni provos kontentigi vin pri via peto.

J. R. — Novy - Bohumin – Se eble, pro la manko de spaco k ĉiam restinta materialo, ni lokigos vian poemeton en estonta numero de P. F. Ni ĉiel sendas al vi koran dankon, pro ĝi k pro via letero.

Lumo de Esp. - Peiping—Via donaco, el malproksima Ĉinio, suferanta ankaŭ akrajn dolorojn, estas emocia. El efika vidpunkto, tio pruvos ke inter la esperantistaj popolanoj ekzistas pli praktika solidareco ol en aliaj tendoj de la ĝenerala popolo. Por ni ambaŭ estas komuna la sama batalo!

Al sendintoj de antaŭaj numeroj – Ni dankas fervore la amikojn, kiuj atentis la peton pri elĉerpitaj numeroj. Sufiĉe jam!

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia